Theodor Storm,

Epilogo

tradukita de Manfredo Ratislavo

Elpensis mi ĝin por konsolo
En tiu tempo de mizer',
En ĉi flortempo de kanajloj,
En tiu temp' de malliber'.

Ne malesperas mi, la mondo
Ja devas ĝoje renoviĝi;
La vera ĝermo de la vivo
Senfrukte povas ne perdiĝi.

La sono de printemp-tempestoj,
Dumnokte timiginta nin,
aŭdebla en arb-susurado,
revenos foje je la fin'!

Kaj tiu lasta tondrobato
Postsonos tute tra l' ĉiel',[2]
Kaj tiam vere printempiĝos
Kaj iĝos luma tagohel'.

Kaj vivu la estontaj homoj!
Kaj la poeto, vivu li,
Levanta el la min' de l' vivo
La gemon de la poezi'!

Traduko de la Germana poemo "Ein Epilog" de THEODOR STORM *(Teodoro Stormo, ∗1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 2002-04-03.*

MR-379-1b / Arg-184-371 (2004-02-24 08:20:58)

La poemo estu kvazaŭ epilogo pri la malsukcesinta germana revolucio de 1848.

[2] aŭ eble: Postsonos tuta tra l' ĉiel',